
# Aliĝo al InterSELa Jambville-renkontiĝo 2010 [Ĵamvil’]

mardi 20 avril 2010, par SEL DE PANAME





http://intersel.apinc.org/spip.php?article1111



Ĉijare, la interSELa renkontiĝo okazos en la nacia instru-centro por la francaj skoltoj, kiu staras en Jambville (departamento Yvelines - 78) ekde la **lundo 16a ĝis la dimanĉo 22a de aŭgusto 2010.**




La Jambville-kastelo, kun sia parko de verdaĵo 52-hektara, povas akcepti 200 homojn en dormejoj kaj 100 homojn en tendejo.

Ĝi estas alirebla per trajno, de la pariza stacidomo Saint Lazare, direkte al Mantes-la-Jolie, ĝis la haltejo Meulan Hardicourt. 15 minutoj per aŭto aŭ buseto necesas por atingi la centron. Granda parkejo disponebla.
Por la atelieroj, ni disponos pri kunven-salonoj kaj eksteraj tendegoj.

La manĝoj konsistos el freŝaj produktoj (ne el biologia agrokulturo). La restoracia servo (mem-serva) estos plenumata de la lokaj profesiuloj. Ni nur helpu laŭvice por la teler-lavado post ĉiu manĝo.


La allogaĵoj de la regiona natur-parko Vexin [Veksen’] estas multnombraj : bestaro, vegetaro, sur-akvaj promenadoj, apudeco de Sejno, kastelo de la Roche-Guyon kun ĝia departamenta legom-ĝardeno, La bienego Villarceaux [Vijarso’] kun ĝia bio-farmo (Fondaĵo por la Hom-Progreso) kaj regionaj specialaĵoj de Francilio.

## Tarifo :

- Manĝo por plenaĝulo loĝanta surloke : 6,50 €
- Manĝo por – 12jarulo loĝanta surloke : 4,00 €
- Manĝo sen loĝ-loko : 7,50 €
- Nokto por plenaĝulo en dormejo : 11,00 €
- Nokto por – 12jarulo en dormejo : 6,00 €
- Nokto por plenaĝulo en tendejo : 6,00 €
- Nokto por – 12jarulo en tendejo : 4,00 €
- Loĝistiko : 10 € / semajne aŭ 2 € / tage (ne repageblaj kaze de nuligo)

NB : Tiu tarifo (simila al la pasintjara) eblas nur dank'al malavaraj donacoj de iuj Franciliaj SEL organizantaj tiun renkontiĝon.

**Unu-taga vizito** : aliro al parko + atelieroj (manĝo el via sako) : 6 €



Antaŭ ol enskribiĝi, bonvolu atente legi tiun-ĉi inform-slipon kaj bonvolu kontroli regule tiun inform-slipon kiu estas reaktualigota.

## Kiel enskribiĝi ?

1 - Nepre antaŭ-enskribiĝi per-rete ekde la 20a de aprilo 2010
2 - Kompletigi la aliĝilon kaj sendi ĝin antaŭ la 30a de junio 2010 kune kun via afabla pago.

Aliĝilo en la franca
Aliĝilo en la angla
Aliĝilo en la hispana
Aliĝilo en la itala
Aliĝilo en la germana
Aliĝilo en la esperanta

# Kiel atingi la renkontejon

## Per trajno :

Ekde la pariza stacidomo Saint-Lazare :
Haltejo Meulan-Hardricourt (direkte al Mantes-la-Jolie)

Atentu : la centro troviĝas je 15 minutoj veturile. Ne forgesu rezervi vian vetur-bileton sur la aliĝlo :
- Buseto 8-loka de la skolta centro : 21 € (pagenda surloke)
- individua veturilo 3-loka : pensu kompensi la benzin-koston al la bonvola ŝoforo.

## Veturile :

Jambville estas atingebla per la rapid-vojoj A13 kaj A15 (v la mapeton).
Se vi vere perdiĝis, akceptejo Jambville : +33 1 34 75 40 84.

MAPO

Koncerne ĉiujn aliajn demandojn, bonvolu turni vin al la diskut-listo
**selidaire-rencontres-annuelles@yahoogroupes.fr**
**Por enskribiĝi, bonvolu sendi malplenan mesaĝon al :**
selidaire-rencontres-annuelles-subscribe@yahoogroupes.fr